



# ORIENTA STELO

Aŭgusto 2015



Orienta Esperantista Federacio  
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation  
Originally founded in April 1932

## Komitato - Kontaktdetaloj

Roy Simmons	Sekretario	01473461346
Barrie Murphy	Kasisto	01702472193
Mark Drake	Komitatano	02085188094
Roy Threadgold	Bultenisto	01371850481

[rokeby@globalnet.co.uk](mailto:rokeby@globalnet.co.uk)  
[celiaandbarrie@tiscali.co.uk](mailto:celiaandbarrie@tiscali.co.uk)  
[marko.drejko@gmail.com](mailto:marko.drejko@gmail.com)  
[roy@boydellsdairy.co.uk](mailto:roy@boydellsdairy.co.uk)


*Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.*

## EKSKURSO AL INSULO SEKRETA

### Dimanĉon la 6a de septembro

Ne maltrafu la septembran ekskurson al la insulo Foulness (Faŭlnes) ĉe la Tamizestuaro. Vizitoj, sen bona kialo, estas kutime malpermesitaj ĉar ĝi estas sekreta armilprovejo. Tamen eblas tien vojaĝi kelkajn dimanĉojn dum la somero por viziti la “Heritage Centre” kiu estas lokita en la antaŭa lernejo – la lernejo kie Roy T. studis (antaŭ multaj, multaj jaroj!).

Nia renkontiĝloko estos la “**Short Stay Parking**” apud la stacidomo **Leigh-on-Sea** je **11.15**



**atm.** por ke ni veturigu de tie tiujn kiuj alvenos trajne. Taŭgaj trajnoj ekiros de Londono, Fenchurch Street je 1010 kaj 1020. Ni ekveturos de Leigh ĉ. 1130 atm. – tuj post la alveno de tiu dua trajno. (Notu la ŝanĝon post mia antaŭa e-poŝto. Network Rail denove kontraŭis niajn aranĝojn kaj decidis ke la trajnoj ne veturos pli antaŭe ol Leigh on Sea tiun tagon). Dank al Arturo por la averto.



Se vi malfruos, iru rekte al la polickontrollejo “Landwick” en Great Wakering kie ni ĉiuj devos halti kaj peti permesilon antaŭ ol antaŭenveturi.

La insulo estas plejparte sub la marnivelo, preskaŭ senarba, venta, kaj laŭ iuj, morna. Sed ĝi estas birdparadizo kaj plenplena je historio. Kun malpli ol 200 enloĝantoj kaj la malfacileco viziti, ĝi estas unu el la plej sekuraj kaj senkrimaj lokoj en Anglio. Dum la lastaj 30 jaroj la insulo perdis ne nur sian lernejon, sed ankaŭ la preĝejon, trinkejon kaj

komunuma halo, kaj la Heritage Centre fariĝis la renkontiĝloko por nunaj kaj antaŭaj enloĝantoj. Oni povas vidi multajn antikvaĵojn konservitajn tie en la muzeo kiuj montras la ĉiutagan vivon tie dum multaj jarcentoj, inkluzive la grandega inundo de 1953 kiu subakvigis preskaŭ la tutan insulon.

Nepros kunporti sandviĉojn se vi deziras manĝi, sed trinkaĵoj kaj kukoj estos aĉeteblaj surloke. La eniro estas senkosta sed oni petas donacojn por daŭrigi sian laboron.

Kvankam la permeso estas nur por viziti la centron, ni esperas aranĝi laŭelektan traktorekskurson de la insulo (veturprezo pagenda).

---

**Nia maja kunveno en Leigh on Sea** ne estis tro homplena; fakte nur sep anoj partoprenis.



Tamen la tago estis agrabla, malstreĉa kaj tute ĝuinda. Barrie kaj Brian iomete tiklis niajn cerbojn dum Roy S. prizorgis niajn stomakojn. Por ekzerci la gambojn, ni promenis ĝis la klifoj de kie oni povis spiri la maraeron, vidi la estuaron kaj, fone, la marbordon de Kent.



**Ŝi** (ĉe spiritisma tablo): "Mia kara edzo, ĉu vi nun estas feliĉa?"

**Lia voĉo**: "Jes."

**Ŝi**: "Pli ol kiam vi vivis kun mi?"

**Lia voĉo**: "Jes, multfoje."

**Ŝi**: "Kaj kion vi faras, tie en paradizo?"

**Lia voĉo**: "Mi ne estas en paradizo, mi estas en la infero."